

# Forpasis Lou Harrison


(1917-2003)

Lou Harrison, la bone konata usona komponisto, kiu forpasis la 2-an de februaro pro koratako je la aĝo de 85, plenigis sian landon per sia muziko dum pli ol duono de jarcento. Sed li estis pli ol komponisto – Lou estis simbolo de la vera internacia artisto.

Por ni en Esperantio, Lou Harrison famas pro sia subteno kaj uzo de nia kara lingvo. Li estis la unua usona komponisto kiu uzis titolojn en Esperanto, ekz. *Konĉerto por Violono kaj Perkuta Orkestro*, kaj estis eble la plej fama membro de la Esperanto-Ligo por Nordameriko. Dum mia skribado de ĉi tiuj pensoj, mi aŭskultas *La Koro-Sutro'n*, lian ĉefan verkon uzantan Esperanton. Jen lia amo por beleco, de la tradicioj de fremdaj kulturoj, de simplaj plezuroj, de *muzika spico* pere de ekzotikaj perkutinstrumentoj (ĉefe la gamelano – la povplena muzikilaro de Indonezio) kaj nekutimaj harmonioj. Jen la ŝato de Esperanto kiel ponto inter kulturoj, inter komponisto kaj lia aŭdantaro.

Lou Harrison naskiĝis en 1917, en la usona ŝtato Oregono. Krom kelkaj jaroj en la 1940-aj, li pasis sian vivon en Kalifornio, kaj oni konis lin kiel *komponiston de la okcidenta marbordo* (li apartigis la stilon de la pli severa, akademia stilo de Novjorko kaj la orienta marbordo). Li dronis en la muzikoj de Azio – Ĉinio, Japanio, Koreio, Indonezio – kaj ankaŭ de Meksiko kaj de la amerikaj indianoj. Oni nomis lin (ĝenerale mokeme) antaŭulo de la t.n. *novaĝa muziko*, sed li interesiĝis nur pri la esplorado de sia propra muzika vojo, la vojo de unuopulo. Li ankaŭ subtenis

la usonan avangardon, kaj amikiĝis kun la elstaraj progresemaj komponistoj en Usono dum la jaroj post la dua mondmilito: John Cage, Edgard Varese, Carl Ruggles, kaj Alan Hovhaness. Kun du el la plej elstaraj komponistoj de tiuj jaroj Henry Cowell kaj Arnold Schoenberg li studis kaj kreskigis siajn proprajn eblojn kiel komponisto. Multaj rigardas al Lou kiel la *baptopatro* de la minimumismo en Usono, pro la ĉarma simpleco kaj dolĉeco de lia muziko.



Lou estis persono ŝatata de ĉiuj, eĉ tiuj, al kiuj ne plaĉas lia muziko. Li famis tra la mondo pri sia feliĉa spirito kaj gastigemo kaj mem volis esti memorata kiel *maljuna viro, kiu multe amuziĝis*. Sed lia kontribuajo al la usona kulturo en la 20-a jarcento – kaj lia

kontribuajo al la scio kaj akceptado de Esperanto en Usono – estas unika, profunda, kaj daŭra.

Kiel komponisto, mi mem ĉiam lernas ion per aŭskultado al lia muziko. Lou Harrison daŭros kiel inspiro al komponistoj, kiuj vere interesiĝas pri la konstruado de pontoj, kaj lingve kaj muzike, kaj Esperante kaj belsone.

David Gaines (Usono)

\*Por legi pli pri Lou Harrison (angla-lingve), eblas viziti lian oficialan arĥivon ĉe: [http://www.sjsu.edu/depts/music\\_dance/centers/harrison\\_archive](http://www.sjsu.edu/depts/music_dance/centers/harrison_archive)